

La lingva situacio en la hodiaŭa mondo

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 544, 1974.03.13 & 16

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Dum nia pasint-semajna prelego ni raportis pri la subita altiĝo de la araba lingvo al la rango de oficiala lingvo de Unuiĝintaj Nacioj.

A.- Ni troviĝas antaŭ grava historia evento, kiu markas la komencon de nova lingva periodo. Pro tio ni opinias, ke estas interese kaj instruige analizi la lingvan situacion de la hodiaŭa mondo. Ni komencos tiun ekzamenon kun rapida historia raporto. Poste ni priskribos la aktualan lingvan ekvilibron. Konklude ni provos montri eblajn evoluojn, ĉiam mezurante la ŝancojn de Esperanto.

Cl.- Estis en la Vestfalia Kongreso, kiu konkludis la Tridek-jaran Militon (1618-1648), ke la latina lingvo ĉesis ludi la rolon de parolata interlingvo. Estas kurioze konstati, ke estis la papa delegacio mem, kiu unue rezignis sin esprimi latinlingve. Ĝi provis trudi al la aliaj delegacioj la uzon de la itala lingvo.

A.- Sed tiuepoke la plej dinamisma kaj bone organizata potenco ne estis itallingva. Ĝi estis la Franca Reĝlando, kie regadis Ludoviko la 14-a. La hegemonio de la franca lingvo komenciĝis okaze de tiu Vestfalia Kongreso, kaj dum proksimume tri jarcentoj la franca estis konsiderata kiel la lingvo de la diplomatio.

Cl.- La franca ĉesis ludi la rolon de unika interlingvo okaze de la interregistaraj kunsidoj de Versailles, kiuj konkludis la unuan mondmiliton. En la palaco, kiu daŭre respegulas la potencon de la reĝo suno, la angla lingvo sin trudis kiel egalrajta al la franca. Por kompreni la gravecon de la angla en la kunvenoj de Versailles, sufiĉas mencii la nomojn de la 4 ĉefaj ŝtatestroj. Ili fakte remodlis Eŭropon: Francion reprezentis Clémenceau, Italion Orlando, Grand-Brition Lloyd George kaj Usonon Wilson.

A.- La Pakto de Versailles, solene subskribita en junio 1919, naskis la mond-organizaĵon Ligo de Nacioj. En la Palaco de Nacioj, kiu stariĝis en Ĝenevo, la debatoj disvolviĝis en du ĉefaj lingvoj: la angla kaj la franca. El tiu dulingveco naskiĝis la doktrino, kiu sin nomas **bilingvismo**.

Cl.- Tre resume la **bilingvismo** proponas, ke la franclingvanoj lernu la anglan kaj la angloparolantoj la francan, kaj ke la aliaj homoj lernu unu el tiuj du lingvoj. Tiel la mondo dividiĝus en du naciaĵoj: ekzistus franca mondo kaj angla mondo. Inter tiuj du mondoj la rilatoj divolviĝus helpe de la traduk-arto.

A.- Fakte tiu doktrino kontentiĝis universaligi kaj eternigi situacion, kiu karakterizis la intermilitan periodon 1919-1939. Sed la dua mondmilito estis mortiga por la brita kaj la franca imperioj.

Cl.- La Konferenco de San Francisko, kiu naskis en 1945 la novan mondorganizaĵon Unuiĝintaj Nacioj, disvolviĝis en kvin lingvoj: tiuj de la venkintaj grandpotencoj. Tiuj lingvoj estas la angla, la ĉina, la franca, la hispana kaj la rusa. Ili fariĝis la oficialaj kaj laboraj lingvoj de UN. Fakte tiu lingva ekvilibro respegulas la politikan situacion en 1945.

A.- Dum la vivo de Ligo de Nacioj la traduk-arto kaj la samtempa interpretado faris grandajn progresojn, dank'al la ekuzo de novaj instru-rimedo, kaj dank'al aŭskult-aparatoj, kiuj ebligas al kongresanoj sekvi la debatojn en la dezirata labor-lingvo. Por neesperantistoj la samtempa interpretado aperas kiel tute kontentiga.

Cl.- Fakte de 1945 ĝis 1971 UN uzis nur 4 labor-lingvojn. Tio longe kiam Ĉinio estis reprezentata en UN fare de la tajvana delegacio, la ĉina lingvo estis neglektata. Sed kiam la pekina delegacio transprenis la reprezentadon de la plej loĝata lando de la mondo, tiam la ĉina lingvo ne plu povis esti malrespektata. Ĉiuj intervenoj de la ĉinoj de tiam esprimiĝis en la ĉina. Por la azianoj kaj afrikanoj tio estis sentata, kiel la fino de la okcidenta hegemonio. Oni tuj komencis senti, ke en UN la okcidentaj lingvoj kun 4 reprezentantoj estas superreprezentataj, kaj ke la aziaj kaj afrikaj lingvoj estas subreprezentataj. La tuta lingva ekvilibro estis rompita.

A.- Kiam oni eniras en periodon de malekvilibroj, tuj okazas ŝanĝoj. Jam du jarojn post la ĉina reoficialigo, la araba sin trudis kiel sesan laborlingvon. La aparatoj por la samtempa interpretado kaj la nombro de la oficejoj je la dispo de la tradukistoj en la Palaco de Unuiĝintaj Nacioj en Novjorko ne estis antaŭviditaj por la uzo de 6 oficialaj lingvoj. Pro tio oni povas antaŭvidi, ke la lingvaj luktoj ne finiĝis. Cetere la okcidentaj lingvoj restas super-reprezentataj, dum la afrikaj kaj aziaj lingvoj daŭre estas subreprezentataj.

Cl.- Pri ĉio tio ni parolos dum nia venont-semajna prelego. Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!